OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

# Sennaciulo




Sennaciulo, majo/junio 2008, n°5/6 (1235/6) ,MENSUEL/MONATA, ISSN 1163.0442, prezo 5 €

# 81-a SAT-KONGRESO EN KAZANLAK (BG)

## Kiel atingi Kazanlakon ?

La distanco Sofio - Kazanlako estas 208 km.
Momente en la reto estas horaro nur por monato junio, ĉar estas riparo de fervoj-linioj.
1 eŭro = 1,95 levoj, kalkulu 2 levoj, pli facile
La trajn-bileto kostas :
 2-a klaso - 9,40 levoj
 1-a klaso - 11,80 levoj

Sofio- Kazanlako -
===============
rapida trajno nr. 3621 ekv. 7h20 - alv. 11h03
urĝa trajno nr. 3601 ekv.15h55 - alv. 19h20
rapida trajno nr.3 637 ekv. 22h00 - alv. 01h40

Kazanlako- Sofio
============
rapida trajno nr. 3637 ekv. 02h54 - alv. 6h38
urĝa trajno nr. 3602 ekv. 8h23 - alv.11h45
rapida trajno nr. 3622 ekv. 17h38- alv.21h20

Per aŭtobuso - la aŭtobusa stacio troviĝas apud la ĉefa fervoja stacio. Bulgare oni diras por la fervoja stacio: gara kaj por la busa stacio: avtogara. Bileto ĝis Kazanlako kostas ĉirkaŭ 6 €.

Horaroj de rektaj busoj de Sofio al Kazanlako:
ekv. 09h00 - alv. 12h58
ekv. 10h30 - alv. 14h30
ekv. 12h00 - alv. 15h43
ekv. 14h00 - alv. 17h43
ekv. 15h00 - alv. 19h20
ekv. 17h00 - alv. 21h08

Horaroj de rektaj busoj de Kazanlako al Sofio:
ekv. 05h30 - alv. 09h50
ekv. 06h30 - alv. 10h13
ekv. 07h30 - alv. 11h38
ekv. 13h00 - alv. 17h00
ekv. 13h30 - alv. 17h28
ekv. 16h00 - alv. 19h43

KONGRESEJO: Hotelo "KAZANLAK", 2 Blvd. Rozova Dolina, BG-6100 KAZANLAK
En la centro de la urbo, 1 km for de la fervoja stacidomo, 5 minutojn piede de la plej proksima aŭtobusa haltejo.



Karaj kamaradoj,

Jen la denove duobla numero, ĉi-foje ankaŭ kun duobla dosiero. En ĉi-tiu numero vi ankaŭ trovos la jarraporton de la Plenumkomitato, kiu estos diskutbazo por la unua kongresa laborkunsido. Provu ĝin legi diligente, ĉar la estonteco de SAT grandparte dependos de via pli malpli aktiva kunlaborado, kaj la kongresaj diskutoj estos pli efikaj, se vi venos al ili iom preparite. Por tiuj, kiuj ne povos ĉeesti, skribaj rimarkoj kaj proponoj ankaŭ estos bonvenaj.

Venontaj dosiertemoj estos:

En julio:

**Naciaj apartiĝemoj**. Kontribuojn sendu al :

José Maria SALGUERO RODRIGUEZ, Rena 11 bajo derecha, ES-06400 DON BENITO,

<saliko69@hotmail.com>.

En aŭgusto-septembro:

**Paco**.

Kontribuojn sendu al:

Colette kaj André Weiss, Lotissement Ader, FR-64250 LOUHOSSOA

<andre-colette.weiss@laposte.net>

Sed kiel kutime, ankaŭ bonvenas kontribuaĵoj pri aliaj temoj. Ne hezitu ankaŭ kontakti la redaktejon se vi havas la impreson, ke iu teksto via forgesiĝis.

Kamaradece via,

La redaktoskipo

# Diversaj informoj...

**El la LEA-oj kaj SAT-rondoj**

En la retejo de LEA/G aperis longa varbad-artikolo pri "Kial ekzistas laborista esperanto-movado" ?http://home.arcor.de/gmickle/leag/t_laborista.html

Anoj de la Poresperanta Fako jam pretigis versiojn en la angla, franca, germana kaj hispana lingvoj. Pliaj tradukoj estas bonvenaj. Pri la aktivaĵoj de la Poresperanta Fako eblas legi pli ĉe:http://www.satesperanto.org/-Poresperanta-Fako-.html

La unuan de majo esperantistoj manifestaciis, aŭ deĵoris ĉe budoj en Bruselo, Lomeo, Liono, kaj Parizo. Okazis la 3an de majo la Dua Kongreso de Arci Esperanto en Milano. Dum la mateno okazis la ordinara asembleo de la membraro kiu, interalie, decidis inviti la Kongreson de SAT en Milano por la jaro 2009. Pri pluaj detaloj baldaŭ aperos la retpaĝo pri tiu ĉi kongreso. En la intervjuo al Andrea Montagner en la kutima spaco radiofonia en Kristall Radio, li bonvenigas la geamikojn kaj gekamaradojn de SAT, kaj ne nur, okaze de la venonta kongreso. Kiel pasintjare, SAT-Amikaro subskribis la alvokon al manifestacio memore al la subpremo de la Pariza Komunumo. La esperanta versio de la alvoko estas legebla ĉe: http://www.esperanto-sat.info/article1153.html

SAT-rondoj ne forgesu elekti siajn kandidatojn por la ĜK-aro antaŭ la kongreso!

**El la amaskomunikiloj**

Reklamo pri esperanto aperis en "Le Monde" de la 9a de majo. Artikoloj pri Eo ankaŭ aperis en du hispanlingvaj anarĥiistaj gazetoj: "El Fuelle" http://www.nodo50.org/juventudesan arquistas/ fuelle.html, kaj "Agitacion"http://agitacion.entodaspartes.net/2008/04/26/anarquismo -anacionalismo- y-esperanto/. La antaŭparolo al la SAT-eldonaĵo "Mortopuno, faktoj kaj dokumentoj" aperis en franclingva versio ĉe http://raforum.info/article.php3?id_article=4676 (la sama retejo, mastrumata de la antaŭparolinto, ankaŭ disponigas esperanlingvan recenzon pri la libro).

Artikolo pri la agado de LEA/H pri la protestoj kontraŭ G8 aperis en "New Statesman" (22a de majo) kaj "Der Spiegel". Aliaj artikoloj aperis en la aprila numero de "Le lien Châlonnais" kaj en la numero de la 29a de majo de "Costa del Sol Nachrichten".

Ankaŭ aperis pluraj elsendetoj ĉe francaj regionaj televidoj (Burgonjo, Nordo, Oriento).

Sennaciulo
OFICIALA ORGANO DE S.A.T
Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90. Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN :FR41 1000 0101 2342 2K02 064 - BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s
Plenum-Komitato de SAT :
Prezidanto : Jakvo Schram
Ĝenerala Sekretario : Krešimir Barković
Kasistino : Thérèse Sabatier
Membroj: Jacques Bannier, Guy Cavalier, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Arturo Prent.
Redakta Komitato - Cyril Orsingher,Tonyo Del Barrio, Viola Ando Murasaki, Djémil Kessous, Petro Levi, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Vito Markovo, Nikolao Gudskov, Gary Mickle, J. Maria Salguero, Jacques Schram, Hans Georg Kaiser. Provizora ĉefredaktoro kaj enpaĝigisto: Krešimir Barković. Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
9 771163 044279
Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas monate - Mensuel. Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER; Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567